

EĈ NE UNU KAPHARO

(LK. 21,1)

La anonco de Jesuo pri la detruo de la templo en Jerusalemo kiu, en eminenta senco, estas sankta loko, ne nur ne timigas liajn aŭskultantojn, sed ĝi ŝajnas ilin flami: "Majstro, kiam do tio estos? kaj kio estos la signo, kiam tio estos proksima?" (Lk. 21,7).

La entuziasmo pro la vortoj de Jesuo ŝuldiĝas al profunda konvinko iam enradikiĝinta en la elektita popolo, Izraelo. En la momento de la plej granda danĝero, fakte, la Sinjoro mem estus interveninta per Sia povo, kaj Li estus disbatinta la malamikojn starigante tiamaniere la regnon de Izraelo kun ĝia regado super ĉiuj paganaj popoloj (Read. 7,27).

Tia konvinko komenciĝis jam antaŭ sep jarcentoj, kiam la reĝo de Asirio, la timinda Senaĥerib, sieĝis la sanktan urbon, li jam estis sieĝinta kaj disfalinta kvardek ses urbojn. Ĝuste kiam la angorplenaj jerusalemaj loĝantoj sin pretigis pasigi tie sian lastan nokton, "En tiu nokto eliris anĝelo de la Eternulo kaj frapis en la tendaro de la Asirianoj cent okdek kvin mil. Kiam oni leviĝis matene, oni ekvidis, ke ili ĉiuj estas kadavroj senvivaj" (2 Reĝ, 19,35). Kaj al Senaĥerib restis nenio alia por fari ol malmunti la tendaron kaj reiri al Ninivo, kie li estis mortigita de siaj filoj mem. La eksterordinara okazintaĵo rezultigis la kredadon ke Jerusalemo, la urbo de la Sinjoro, neniam estus konkerita, kaj ke Dio mem estus interveninta por ĝin defendi, ĉar "Dio estas en ĝia mezo, ĝi ne ŝanceliĝos" (Psal. 46,6).

Jesuo invitas ne kredi je tiuj ĉi iluzioj.

La mirinda templo "ornamita per belaj ŝtonoj kaj oferdonoj" (Lk. 21,5), ne nur oferas neniun ŝirmon, sed ĝuste al tiu ĉi loko sin adresos la ruiniga kolero de la romianoj: "Rilate al tio, kion vi vidas, venos tagoj, en kiuj ne estos lasita ĉi tie ŝtono sur ŝtono, kiu ne estos deĵetita" (Lk. 21,6 ; 19,44 ; 13,35).

Jerusalemo ne estos detruita pro dia puno, sed pro la kulpoj de la zorgemaj gardantoj de la tradicio, de la religia ortodokseco, de la Leĝo, pro la kulpo de tiuj kiuj por defendi la veron (ilian veron) estas pretaj murdi, kaj de tiuj kiuj por konservi la doktrinon (ilian doktrinon) ne hezitas ruinigi tiujn kiujn ili vidas kiel ties kontraŭulojn.

Ĉiuj kiuj opiniis esti minacataj de la paganoj ne komprenas, ke ili mem estas minaco por la popolamaso. La intercivitanaj bataloj, la dezirego je povo, la religia fanatikeco, tiuj ĉi aferoj estis la kialoj de la disfalo de Jerusalemo kaj de ĝia Templo, "kaverna de rabistoj" (Lk. 19,45) kiu transformiĝas en batalkampon por la divido de la rabaĵo kaj de la povo.

La respondeco pri la ruiniĝo de Izraelo devas esti serĉata ĉe la religiaj aŭtoritatuloj. Jesuo jam estis evidentiginta tion en la parabolo pri la mortigaj vitkulturistoj adresita al la skribistoj kaj al la ĉefpastroj (Lk. 20, 9-19). Estas tiuj ĉi kiuj mortigas ĉiujn senditojn de Dio, kaj eĉ Lian filon, pro dezirego je povo (*"Ĉi tiu estas la heredonto; ni lin mortigu, por ke la heredaĵo fariĝu nia"* (Lk. 20,15) En la mortiga miksaĵo de religia fanatikeco kaj furioza naciismo, la Zelotoj estas taksataj de Jozefo Flavio kiel la ĉefaj respondeculoj de la katastrofo: *"Pri la fino de Jerusalemo kulpas la frenezaj revoluciuloj"*(Pri la juda milito VII, I, 4).

Sekve, la katastrofo anoncita de Jesuo ne portos al eltombigo de la mortinta regno de Izraelo (Agoj 1,6), sed ĝi alportos la naskiĝon de la regno de Dio, kiu ne estos sendolora, ĉar la universala mesaĝo pri la regno de Dio nuligas la privilegion de Izraelo kaj la revon je ĝia regno. Pro tio kuniĝos kontraŭ la sekvantoj de Jesuo ĉiuj tiuj povoj kiuj sin sentos minacataj de la alveno de la regno de Dio, de la religia institucio (*"oni persekutos vin, transdonante vin al la sinagogoj"* Lk. 21,12) al povohavantoj (*kondukante vin antaŭ reĝojn kaj provincestrojn"*, Lk. 21,12) ĝis eĉ al la familioj mem (*Sed vi estos transdonitaj eĉ de gepatroj kaj fratoj kaj parencoj kaj amikoj; kaj iujn el vi oni mortigos."*Lk. 21,16).

La aliĝo al Jesuo, kun la ĝisfunda renversado de la valoroj, estas krimo tiel grava, ke ĝi sukcesas nuligi eĉ la plej firmajn familiajn ligojn. Antaŭ ĉi tiu pendanta katastrofo, kiam ŝajnas ke ĉio estas perdita, Jesuo ne uzas kompatemajn vortojn por siaj sekvantoj, sed Li malkaŝas al ili grandan veron: *"Eĉ unu haro de via kapo ne pereos. Per via pacienco vi akiros viajn animojn"*(Lk. 21, 18-19).

Kiuj sin agordas kun la vivo kaj la amo, tiuj jam estas venkintoj, ĉar ili estas jam en la sama ondolongo de la Kreinto kiu amas la vivon, pro tio la ilia estos vorto kaj saĝeco fronte al kiu *"ĉiuj viaj atakantoj ne povos rezisti nek kontraŭdiri"*(Lk. 21,15).

Alberto Maggi